

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

Úvahy reální a estetické

Podle statistiky francouzské Akademie činí počet živých jazyků na celém světě 2.796. Nejrozšířenější řečí je čínština, kterou mluví 488 milionů 573.000 lidí. Následují hindustanština, angličtina, ruština, španělština, japonština, němčina, francouzština a portugalská. (Svob. noviny 28. 8. 1946.)

Díkem moderním vynálezům, jsou mezinárodní styky světové stále intenzivnější, potřeba jednoho společného dorozumivacího jazyka se cítí stále naléhavěji. Přívrženci esperanta mohou poukázat k tomu, že ono našlo půdu i mezi nejvzdálenějšími národy a že na př. v Číně a v Japonsku odedávna až do poslední doby vycházely časopisy a byly vydávány knihy v esperantu. V 7. čísle našeho listu jsou uvedeny esperantské časopisy, vycházející už v nové Číně v Pekingu a v Šanhai.

Čínštinou mluví čtvrtina lidstva, téměř půl miliardy. Pomocný světový jazyk esperanto našel i tu své přívržence.

Nás Čechů jest nepatrný zlomek a přece si domýšlivě osobujeme často kritiku jazyka, který jest určen pro ohromnou většinu ostatního lidstva.

V každém jazyku jsou některé zvláštnosti, které cizincům se zdají podivné, ba i směšné.

Tomu se nevyhne ani esperanto a bude proto kritisováno. Co se však nelíbí nám, může lahodit uchu jiného národa. Nám Čechům se nezamlouvají po stránce estetické na př. tvary jako »ču«, »čiam«, »kiam«, atd.

A možná, že jsou to právě tyto částice, které ucho Čiňanovo nijak neuráží a jsou příjemné jeho krasocitu. U nás

na př. slabikou »ču« začínají téměř napořád jen slova, která neradi vyslovujeme (na př. čuměti, čumák, atd.). Po-díváme-li se však na mapu Číny, nalezneme tam názvy Čung-King, Kvai-Ču, Čau-King, Kau-Ču, Fu-Ču, Ču-kiá-kou, a pod. Čínský ministr zahr. věcí jmenuje se Ču-En-Laj.

Esperanto má naproti tomu celou řadu výhod, které mnohonásobně převyšují maličkosti, jež nám Čechům se zdají nevhodné.

Kromě své libozvučnosti zamlouvá se nám esperanto i tím, že jako čeština používá jednoho písmene tam, kde jiné jazyky pro určitý zvuk, který naše ucho slyší jako jediný, jsou nuceny používat celé řady písmen. My těžko můžeme pochopiti snahy, aby se odstranila písmena, opatřená háčky (supersignitaj literoj), neboť se nám to zdá býti krokem zpět proti vymoženosti, kterou zavedl Dr. Zamenhof a u nás Jan Hus.

Nám je naopak nepochopitelné, proč na př. Němci píší tschechisch, tscherkessisch, proč Francouzi píší Queuille a čtou Keij, Rochefoucauld (Rošfuko), Rousseau (Ruso), Angličané Shakespeare a čtou Šekspír, atd.

O libozvučnosti esperanta svědčí nejen díla Zamenhova prosaická i básnická (Sub la verda standardo, Ai la fratoj, La vojo), nýbrž i překlady našich esperantistů, tlumočící česká díla básnická i hudební (Erbenova Kytice, opery Prodaná nevěsta, Rusalka, V studni).

Dr. Jos. Fousek.

Juneco kaj paco

»La homa kulturo estas nur unu. Oni ne povas dividi ĝin je kulturoj orienta kaj okcidenta. La antaŭa generacio transdonas la stafeton de kulturo al la sekvanta generacio, kaj vi, la junaj, akceptas la stafeton de homa kulturo, la torĉon de scienco, kun kiu vi iros. Ĉiu el vi havas ankoraŭ multe antaŭ si kaj nemulte post si. Sur viaj ŝultroj kuŝas hodiaŭ peza respondeco.

Vi respondecas pri la homaro, pri literaturo, pri Dante, Goethe, Shakespeare, Tolstoj. Vi respondecas pri tio, kion al vi postlasis la antaŭaj generacioj, vi devas tion plu transdoni, vi respondecas pri la estonteco. Vi respondecas pri la vivo de viaj junaj fratinoj kaj fratoj. Vi respondecas pri tio, ke vi nek lernis, nek serĉis, nek konstruis superflue. Mi scias, ke vi tion plenumos.«

Tiuj ĉi vortoj de la fama sovena verkisto Ilja Ehrenburg, kiujn li diris el la tribuno dum kunveno de la II. Kongreso de la Internacia Asocio de Studentoj en Praha, pli bone montras la sencon, celon kaj mision de la historia kunveno de la mondorganizaĵo de la studenta junularo ol la plej bona komentario.

*

Ĉiu, kiu dum nunaj tagoj venos en la vastan halon de la Praga Industria Palaco, estas por momento en medio, kiun oni longe ne forgesas. Tie sur la malgranda peceto

de la mondo malaperis la limoj de ŝtatoj, malaperis la diferencoj de haŭtkoloro, de lingvoj.

Krisphara negro el Nigerio kompeniĝas kun blondhara Angliano el Oksford, amerika studentino de sociologio donas demandojn pri studmetodoj en sovetaĵ lernejoj al juna doktoro de natursciencoj el Moskvo, purpuraj kimonoj de mongolaj studentinoj alternas kun tradiciaj universitataj ĉapeloj de italaĵ alternantoj, la bluo de asoci-ĉemizoj de niaj knaboj kaj knabinoj miksas sin kun la kakia-koloro de la vestoj de ĉinaj studentoj, la gorĉa korea parolo sonas apud melodio franca lingvo.

Tie ĉi efektive kunvenis la floroj de la junularo el la tuta mondo.

La koroj de ĉiuj tiuj junaj homoj el 62 nacioj de la tuta mondo batas per unu sento... la sopirado de ĉiuj kuniĝas en unu granda ideo: konservi la pacon, naciان sendependecon kaj ebligi al ĉiuj subpremitaj fratinoj kaj fratoj liberan kleriĝadon sur demokrata bazo.

Fragmentoj tradukitaj el artikolo de Jiří Pražák en »Práce«, 20. 8. 1950.

Tradukintino rimarkigas: Nunjare unu internacia kunveno sekvis la alian. En la vastaj rondoj de la popoloj la urgá bezono de unu lingvo internacia fariĝas ĉiam pli kaj pli evidenta.

Julie Bendová.

Vašek Káňa: Ĉu oni povis iam supozi...?

La Orient-ekspreso atingas el Prago la urbon Ŝtúrovo post dek unu horoj. Jen surta tempo, por ke oni vidu ĉion novan, kio laŭlonge de la fervojlinio en la pasinta jaro ankoraŭ ne troviĝis. Novajn fabrikejojn, pontojn, ŝoseojn, loĝodomojn. Sufiĉa okazo, por ke oni salutu la unuajn garbokonusojn en la regiono de Kolín kaj la lastajn en la sudo de Slovakujo. Kaj tiam, por ke oni salutu la sur uzinoj kaj stacidomaj muroj lokitajn afiŝojn, sur kiuj ridetas la karaj vizaĝoj de niaj Stalin kaj Gottwald. La urbo Ŝtúrovo apud la hungara landlimo bonvenigas vin ne tro afable. La hotelo Dunaj (= »Danubo«) surhavas ankoraŭ postesignojn de la milito, same kiel la katedralo de Esztergom sur la hungara bordo de Danubo. Ĝi estas plene okupata, kaj sekve restas nur la alia hotelo, la Central, kies posedanto estas iom nekomplezta, ĉar — ĝi estas alnaciigota kaj aligota al komunumaj entreprenoj. Surstrate oni audas ankoraŭ la ĝentilan »ruky bozkávam« (= »mi kisas viajn manojn«) aŭ la hungarlingvan alparolon »nagyáságos« (= »via moŝto«). La malnova burĝa Slovakujo finvivas tie siajn lastajn momentojn, same kiel la motorfikristo, kiu morgaŭ matene veturigos min al la destinloko, al Kamenín. Li, la kompatindulo, pro sia ĝentileco ŝanceliĝas, kiam veturprezon li postulu. Cent kaj iom da kronoj pli aŭ malpli, prefere plus. Dum la sorto lin ankoraŭ favoras. Longe ja tio ne plu daŭras. Same kiel en la hotelo Central.

Kamenin super Hron estas komunumo markita de la milito. Postfenestre kiel memorigaĵoj kuŝas kuglingoj kaj ventroformaj minoj, la dometoj estas surŝprucitaj per grenado-truoj, kelkloke troviĝas duonruinoj kun nuda klinita tegmenttrabaro. Tra tie ĉi la soveta armeo pelis la faŝistojn. La plimulto de la loĝantaro apartenas al la hungara nacio. La vilaĝo estas plena de movado, meze de la plej diligenta rikoltlaboro. Sur la kortoj bruas draŝmaŝinoj, transport-aparatoj amasigas pajlostakojn sub la pale blua firmamento. La suno ĉi tie brilas varmege kaj gluas la ĉemizojn sur la dorsoj de la laboruloj. Traktoroj de tempo al tempo levas nubojn da polvo, senvestaj sunbrunaj uloj sidas en trenveturiloj sur sakoj da greno. La terkulturista magazeno-kooperativo estas ornamita per standardoj, kaj kampuloj staras tie kun veturiloj plenŝarĝitaj per greno, »ankoraŭ varma« de la draŝmaŝino. La deaĉeto de la greno vige progresas. Videblaj estas stakoj de riĉa bienulo, superantaj la firstojn de la domoj. Ĉi-jare ankoraŭ. En la venonta jaro nepre superos ilin stakoj de la Unueca Terkultura Kooperativo, kies fondo aktivigis la tutan vilaĝon. Oni laboras por kaj kontraŭ la Unueca Terkultura Kooperativo, tamen la fortoj de la »por« estas multe pli grandaj, nome tial, ke Kamenín estas komunumo de etkampuloj, kion ja atestat la mozaiko da mallarĝetaj kampostrioj. En Kamenin oni komencas ekkoni la aferojn kaj la homojn en stadio de granda rompo kaj grandaj ŝanĝoj, kaj baldaŭ komencas antaŭ ni elkoviĝi la novo. Sufiĉas bone rigardi kaj bone aŭskulti.

Sütő bácsi (= »la onklo Sütő«) ankaŭ finis la rikolton de sur la luitaj tri akroj da eklezia grundo kaj explore rigardas sian staketon. Sütő bácsi estas laboristo, li laboras ĉe telefon-konstruado. Li estas membro de la Partio kaj membro de la Unueca Terkultura Kooperativo. Li ĝuste estas forpermesita, kaj li sentus sin tre malfeliĉa, se li pasigus eĉ nur unu horon senlabore. Li do helpas la najbarojn ĉe la draŝado. Vespere, jam en mallumo, sur irvoĵeto

Letero el Dobříš

La vivo plenumas eĉ dezirojn, pri kiuj oni pro manko de tempo eĉ reŝi ne povis. Mi sidas en lernoĉambro, el la larĝa koridoro, kies plankon kovras tapiŝo, aŭdiĝas voĉo de la sonorilo. Ĝi kunvokas la gelernantojn. La plej juna estas dekokjara, kaj poste gradiĝas la cifero de ilia aĝo ĝis sesdek du. Ni frekventis lernejon sole ĝis nia dekdua jaro, poste la gepatroj elpostulis por ni liberigan permeson,

inter maizokampoj mi renkontas lin ĉirkaŭkovrita de polvo kaj aristoj, rapidanta kun ŝapo kaj viŝtuko al la rivero Hron. Ĝustumomente la bruon de la draŝmaŝinoj jam anstataŭas ĉirpado de griloj kaj cikadoj, kaj la viiagon kuŝokupas maŝvarmeta nokto, elspiranta odoron de pajlo kaj grajnaro. Sur la »stranaco« de Kamenin pliaŭde sin banas gevitroj kiel anasoj, akvo ŝprucas, audigas rido, la bano ja estas laŭmentita. Ankoraŭ nodiau kaj morgaŭ, — kaj poste Sütő bácsi ree jam starigos telegratstangojn laŭlonge de slovakaĵ ŝoseoj, ree li sovelos kaj pioĉas, por ke homoj povu transsendi inter si sciigojn ĝis malproksime. Ankaŭ tiun, ke la komunumo Kamenin en la distrikto de Ŝtúrovo plenumis la planon pri la deaĉeto de greno multe pli ol centprocente. Nia bácsi estos tie menciita eĉ ne per unu vorto, kaj tamen la sciigo temos ankaŭ pri li, ĉar li donacis al la Kvinjar-Plano la tutan tempon de sia forpermeso. Same senpiende kaj same ofereme kiel la junaj laboristoj kaj meti-lernantoj, kiuj venis ĉi tien, en sian hejmon, el la uzinoj de Bohemio, Moravio kaj Slovakujo, por helpi ĉe la rikolto kaj draŝado.

Kaj la »eksternejmuloj« de Kamenin, edukataj en fabrikejaj kolektivoj de meti-lernantoj kaj laboristoj, posedas grandan meriton pri la ŝanĝoj en la vivo de sia naskiĝa vilaĝo. Ili hejmenportas sciigojn pri nova vivo, super kiuj la hejmanoj nekredeme skuas la kapojn. La loka porkpaŝtisto kun tutjara enspezo de 5000 Kčs aŭskultas ilin kun laŭvorte malfermita buŝo, kaj kiam li jam ekredis, li miras: »Ĉu oni povis iam supozi, ke ministlernanto perlaboros pli grandan sumon ol mi?« Ĉu oni povis iam supozi, ke filo de proletoj el Kamenin skios, boksos, kaj tiel plu? Ĉu oni povis iam supozi, ke ĉi-tieaj knaboj »simple« fariĝos elektroteknikistoj, maŝinistoj, traktoristoj, kaj ke oni samtempe garantios al ili konstantan laboron kaj bonsufiĉan salajron? Ni kutimis ĝoji, se la mastro nian dekseshoran laboron rekompencis per aĉk kronoj... La paŝtisto miras, kaj li devas miri, ĉar antaŭ liaj okuloj maleblaĵo fariĝis ebla kaj reala. Kaj kial do eĉ li mem ne povus vivi same bone? Kaj jen tuj prezentiĝas respondo: En la komunumo Kamenin por la venonta jaro vakos la posteno de porkpaŝtisto. Kaj ankaŭ multaj pluaj laborfortoj disponeblas por industrio. Tiel aspektas ĉi tie la blovo de la nova freŝa vento. Ankaŭ ĉi tie, en regiono de Slovakujo, kiun mi samtempe hazardoprove elektis sur la mapo. Tiel videble aliformiĝas la vizaĝo de tiu ĉi lando, kiu unuafoje en sia historio, laŭ la vortoj de sia nacia himno, la katenojn ŝiras. La memkonscio de la popolo ankaŭ ĉi tie potence elkreskas, la humiligitoj fariĝas fieraj. Pri sia laboro, pri si mem, pri sia patrolando.

»Ĉu oni povis iam supozi, ke mi, simpla sukerfabrika laboristo, libertempos kaj vojaĝas, kaj krome en internacia ekspreso?« diris al mi en la trajno slovaka laboristo, veturanta kun siaj infanoj al Gottwaldov. Ĉu oni povis iam supozi, ke la uzino ne rifuzos lian peton, ke li ne devas kvereli pri sia salajro? Ĉu oni povis iam supozi, ke li rajtos eniri oficejon de la fabrikkomandoro, ne timante, ke oni elpelos lin? Ĉu la sinjoroj traktis lin iam kiel homon?

La memkonscio de tiu ĉi laboristo estis eĉ kortuŝa. Kiam ni enveturis Bratislava'n, li fiere fingromontris la urbon, plenan de belaj novkonstruaĵoj: »Rigardu, jen nia Bratislava!« Kaj post momento li diris ankoraŭ pli entuziasme: »Kaj ĉio nun apartenas al ni.« El la ĉeĥa Miloš Lukáš.

kaj jam venis devoj. Kial tamen mi diras: venis? Ĉu mi entute memoras, kiam unuafoje mi devis el la budo alporti lignon, la kelkon da ŝtipetoj, kiujn kapablis ampleksi miaj malgrandaj brakoj, kaj meti ilin en la subfernan niĉon? Kaj de tiu momento komenciĝis ĉeno da sennombraj, neniam finiĝantaj devoj, pro kiuj estis necese forlasi la lernejbendon, kaj la lernolibrojn flankemeti post subteg-

menta trabo. Kaj poste nur kolekti eretojn de ŝteltaj momentoj, forrampi malantaŭ fajnamason kaj lerni kaj lerni. Aŭ sidi ie sur kamplimo en somera tagmezo, post kiam la aliaj el la domo foriris al la tagmanĝo, kun papero sur la genuoj kaj verki. Temis pri nevenkebla sopiro, kaj al neniu venis eĉ ideo, ke li helpu al mi realigi ĝin. La sopiro pri libro ĉiujare plikreskis. La montraj fenestroj de libro-vendistoj en la tempo de senokupeco logis min, ke mi almenaŭ momenton pasigu sur la trotuaro kaj tra la vitro legu la librotitolojn sur la kovriloj. Mi servis kiel vazarlavistino en ekskursita centro de riĉuloj. Senluma ĉambro malantaŭ la kuirejo, la sola fenestro direktiĝanta al la kuirejo estis konstante barita per amasoj da teleroj, metataj tien de la kelneroj, — du kuvoj da akvo kaj kradita kanaló, en kiun oni enverŝis akvon.

Tiutempe mi pensadis: eĉ en stalon laŭdire venis Dio, neniam li tamen enirus la malluman ejaĉon, kie oni dum la tuta tago lavas vazaron.

Poste trafis en miajn manojn la verko de Ivan Olbracht Anna la Proletino. Kontraste al aliaj romanoj la ĉefrolon en ĝi ludis servistino. Sed tio ne estis la plej grava afero. Multe pli grandan instruon donis al mi la libro. Por pli bona vivo ne sufiĉas preĝi, oni devas por ĝi batali. Kaj hodiaŭ, post tiomjara paŭzo, revenis la lernejaroj. Kun kia timo mi veturis ĉi tien! Mi vidiĝis al mi mem kiel cigano, kiu ne konante la muziknotojn ludas violonon, kaj mi timis la lernadon, opiniante, ke mi perdas la kuraĝon verki. Kaj ĝi estas lernado tute alispeca, kvankam neniam pli facila. Tiu ĉi lernado ne estas tamen laĉita per formuloj nek per reguloj. Ĉiutage prelegas alia verkisto kaj transdonas al ni ion el siaj abundaj spertoj, same kiel arbo donas al homoj fruktojn.

Kaj la kastelo, pri kia ni en nia infanaĝo aŭdis rakonti en fabeloj! Floroplenaj bedoj, aranĝitaj en ravan ĉarmon de orient-devenaj tapiŝoj, fiŝlago kaj herbejo en parko, izoloj kverkaj, deklivoj, el la interspacoj de la branĉaro oblikvaj radioj de la matena suno, kaj multforka pino, laŭ kies branĉoj oni povas ĝisgrimpi la supron kaj rigardi la blujn montetojn de l'arbaroj de Brdy! Kaj nun venas tien homo, kiu de sia junaĝo rajtis rigardi la vivon sole el post barilo. Mi rekte sentas internan instigon, ke mi kolektu ĉion plenbrake. Kaj mi renkontas homojn, kiuj ekkomprenis la pasian sopiron, kun kiu mi venas ĉi tien, kiun mi delonge portis en mi, kaj ili ofere me klopodas por helpi min. Kaj hejme post mia reveno atendas min la plej bela tasko. Riĉa kaj plena laboro.

Marie Dušková. (Tradukis Miloš Lukáš.)

Raymond Schwartz:

Už náhrobní jen kámen . . .

Vím o nevelkém kraji
tam v srdci Evropy . . .
kdo z těch, kdož soucit znají,
jej slzou nezkropí?

V tu zem se zahlíd' s chutí
pan soused v době žní
a pojal rozhodnutí,
že postupně ji sní.

Vzal pásmo, neměl dosti,
i druhé, třetí zhmát',
a neměls pochybnosti,
že dál si bude brát.

Když vlku sousto hodíš,
pak vždycky jist si buď,
že s dobrou nepochodíš,
neb s jídlem roste chuť!

Z esperantskeho originálu přeložil Miloš Lukáš.

Ni publikigas tradukon de la poemo »Nur epitaf'atestas«, kiun ni enpresis sur p. 63. La bona poemo meritis bonan tradukon.

Vím o zemičce malé,
kde Evropy je střed . . .
Teď nenajdeš ji ale,
ni máš-li drobnohled.

Už náhrobní jen kámen
a nápis vrytý v něm
nám zvěstuje, že amen
je s Československem.

Však jednou-věc to jistá!
se vzkřísí z popelu,
a odvetu tím schystá
dnešnímu údělu.

Což tělo, to se zkruší,
a třebaš pistolí,
leč dát si spoutat duši,
to lid už nesvolí!

KRONIKO ENLANDA



Rudolf Hromada sesdekjara. Li naskiĝis en Praha la 9-an de novembro 1890. Esperantisto li fariĝis kiel studento de liceo en 1907. Jam en 1911 aperis de li tradukita broŝuro »Popolsumigo en Aŭstrio«. En »Bohema Esperantisto« el 1911 kaj 1912 estas de li pluraj kontribuadoj, inter aliaj precipe ĉeĥa traduko de la »Antaŭparolo al la Unua Libro« de Zamenhof kaj ĉeĥlingva »Komento pri vortoj ofte erare interŝanĝataj« kompilita laŭ la Kabe-Vortaro. Tiam ekzistis inter ĉeĥaj esperantistoj pasia disputo de du partioj. Unu kiu sekvis la Beaufrontan metodon de propagando: troigadi la rezultojn akiritajn. Dua kiu rekomendis persisti ĉe faktaj laŭveraj, eviti mensogon kaj duondirojn. La dua partio estis en malplimulto. Hromada aliĝis al tiu minoritato, en B. E. estas repesita lia protokolo pri la tria jarkunveno de la »Bohema Asocio Esperantista« la 5. 1. 1912. Jam tiam estis videble, ke rolo, kiun li ludos en la movado, estos tre diversfaka. Kaj oni pardonu al ni konstaton ĝojigan, ke fine venkis tiu partio de vereco; eble tio ankaŭ pravas teorion kredigantan, ke servi al la vero estas ne sole honesta sed ankaŭ utila. Post la unua milito Hromada kunlaboris pri revivigo de la movado, kunfandiĝo de tio, kio restis el Bohema Unio Esperantista kaj el Bohema Asocio Esperantista, kaj kiam la 1-an de februaro 1920 estis kreita Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, li estis elektita ĝenerala sekretario. Tiam jam la movado reviviĝas kaj firmiĝas internacie. Hromada kunlaboras en reorganizo de Universala Esperanto-Asocio kaj havas la ideon proponi al ĝi presigi la organon »Esperanto« en Praha dum la malalta stato de kurzo de ĉeĥoslovaka krono. La propono estis akceptita kaj la gazeto estis sub lia kontrolo presata dum pli ol 12 monatoj en Politika en Praha, kio signifis notindan ŝparon por UEA kaj eksporton de ĉs presitaĵoj. Kaj tuj post la deflacio sciis li likvidi tiun aranĝon taŭgatempe. Samtempe li organizas la movadon enlandan. En La Progreso kaj en Esperantský zpravodaj estas konservitaj liaj alvokoj, raportoj kaj instigoj vidigantaj persistemon, kun kiu li provadis la plej taŭgan formon de organizo. Daŭris jarojn ol ni venis al taŭgaj ciferoj de kotizoj kaj reguligis rilatojn inter la centro kaj la lokaj grupoj. Loka patriotismo de grupoj devis esti venkata.

En 1921 fondas Hromada kune kun Bouška »Ĉeĥoslovakian gazeton« kun aldono »Nova Eŭropo«, informanta pri malgrandaj nacioj kaj batalanta por iliaj rajtoj. Aperis 14 numeroj de tiu ĉi gazeto ĵurnalforma, unu el provoj batali per Esperanto por novaj ideoj. En 1923 transprenis Hromada eldonadon de »La Progreso«, pligrandigis ĝian amplekson kaj eldonadis ĝin je propra risko ĝis januaro 1935. La gazeto estis dediĉita ankaŭ al organizaj bezonoj de CAE, la fama mallongigo tiom ofte aŭdita. Hromada

kreis tradicion de ĝia administrado kaj de ĝiaj labor-metodoj kaj montris celojn. Dum la okupacio li travivis kvar jarojn en germana koncentrejo. Reveninte li tuj reprenis poresperantan laboron. Akceptis funkcion de vicprezidanto de nia Asocio kaj dum pli ol du jaroj li estis unu el parolistoj en esperantlingvaj dissendoj el Praha.

Sed Hromada estis ankaŭ tre aktiva en internacia sfero, partoprenis aktive multajn kongresojn kaj konferencojn internaciajn, precipe tiujn de Parizo kaj Locarno, ĉe konferenco »Paco per Lernejo« en Praha 1927 li estis unu el la ĉeforganizantoj. Multajn jarojn li estis komitatano de UEA. En 1924 li estis elektita ano de la 6-membra Internacia Centra Komitato, en kiu li restis ĝis 1930. kiam li estis nomita ĝia konsilanto. Ĉeĥo laboris en gvida pozicio de la movado partoprenante persone kaj koresponde.

Tre baldaŭ fariĝis Hromada ankaŭ tre funda scianto de la lingvo mem, sperta pri teorio kaj praktiko same. En »La Progreso« li komencis publikigadi tekstojn por traduko; liaj definitivaj tradukaĵoj kaj rimarkoj estas eksterordinare instruaj por ĉiu, eĉ por tre bona tradukanto. Tiu serio estas daŭrigata en nia revuo kaj meritas ĉiam la plej zorgan atenton. Liaj prelegoj en Radio estis iaŭ la lingva maniero same elstarantaj. Liaj vortaroj Esperanta-ĉeĥa (kun Petr) el 1926, dua eldono el 1932, kaj Ĉeĥa-esperanta el 1949 dokumentas lian profundan senton por esprimnuancoj. Liaj prozaj tradukoj povus esti tekstoj instruaj. Liaj tradukoj versaj estas poemoj. Ni rememoru por ekzemplo »Ruĝa floro« kaj »Maryčka Magdon« de Bezruč. Sed tre multaj restas nepresitaj, la aŭtoro estas tre severa al si mem. En la nuna tempo li kritike esploras laŭ ilia taŭgeco por kantado tradukojn de ĉeĥaj popolaj kantoj kaj de samtempaj kanzonoj modernaj kaj mem tradukis plurajn tre taŭge por tiu celo.

Profesie li estas banka oficisto, persone homo aminda, kontenta edzo de esperantistino, amata patro de filo Jiří kaj filino Eva kaj fiera avo. Li estu salutita de ni ĉiuj.

Saluton al la ĉina popolo, konstruanta novan socialisman Ĉinion, sendis ĉeĥoslovakaj esperantistoj per letero verkita de prof. Miloš Lukáš kaj sendita de nia Instituto en oktobro al Ŝanhaja Esperantista Ligo (P. O. Kesto 936, Ŝanhajo) en multaj ciklostilitaj ekzempleroj, por ke ĝi estu tie disponigita al multaj interesitoj. Jen kelkaj alineoj: »Ni, la ĉeĥoslovaka esperantistaro, prezentas nian manon por kunlaboro kun proletaro de l'tuta mondo, kaj unualoke kun la proletaro de la popolo Ĉinio pere de la internacia lingvo Esperanto. Tial ni, la ĉeĥoslovaka esperantistaro, ĝoje akceptis la fakton, ke la esperantistoj de Ĉinio informas nin gazete kaj koresponde pri la konstruado de la nova Ĉinio, kaj ke ni ne devas ĉerpi sciigojn en anglaj presaĵoj, ĉar la angla lingvo siatempe kunhelpis la penetradon de la imperiistoj en via lando... Kaj tial ni proponas ankaŭ al vi, karaj ĉinaj kamaradoj, ke vi ankoraŭ plivastigu la Esperanto-servon en via liberigita patrolando kaj ke vi veku ĉe viaj publikaj faktoroj intereson pri tiu ĉi propagando... Kamarade ni premas vian manon kredante, ke ĝuste vi, la liberaj ĉinoj, povas tre efike kontribui al disvastigo de Esperanto en la mondo, por utilo de via libera lando, por utilo de via laborula popolo surbaze de la proleta internaciismo.«

»Nia universitato batalas kontraŭ faŝismo«, jen devizo de detala esperantlingva letero de Horada Masamiči, asistanta profesoro, inĝeniera doktoro, prezidanto de laborista fako ĉe universitato en Tokio, kiun li adresas al »akademiaj civitanoj, intelektuloj de l'tuta mondo.« La letero priskribas tre konvinke kaj impete la limigojn de la universitataj liberecoj en Japanujo kaj tendencojn de imperiistoj instigi malanon kontraŭ komunismo kaj kontraŭ Soveta Unio, eduki studentojn por fimi »la ruĝan danĝeron« kaj »defendi nian sociordon«. Jen kelkaj frazoj el ĝi: »Ŝajnas, ke revenis la tempo, kiam militaristoj fanotike pelis japanan popolon en agresian militon... La 13-an de marto la universitata estraro decidis limigi en la univer-

sitato liberecon de deklarado, kunvenado, societado pli severe ol ĝi estis antaŭ la milito... Ni esperas, ke vi apogus progresemajn fortojn en la Tokia universitato... kaj ni petas, ke vi sendu avertan proteston al estraro de la universitato, kiu estas trenata sub influon de milit-instigantoj, precipe al rektoro Nanbara Ŝigeru.« Ĉeĥan tradukon fare de prof. M. Lukáš de tiu ĉi longa letero, sendas nia Instituto al universitataj profesoroj kaj diversaj instancoj de ĉs altaj lernejoj.

Unua regiona laborkonferenco de Slovaka Esperanto-Societo en Vrútky la 8-an de oktobro akceptis porpacan rezolucion adresitan al Ĉs Komitato de Pacdefendantoj. En ĝi la konferenco senrezerve aliĝas al la Stockholma rezolucio el marto 1950 postulante absolutan malpermeson de la atom-armiloj, kaj malakceptante ĉian formon de milito por solvado de miskomprenoj inter la nacioj. Krome la konferenco postulas tujan ĉesigon de bataloj en Koreo kaj finigi la suferon de la Korea popolo. Fine la rezolucio devontigas esperantistojn honeste kunlabori kun tiuj, kiuj gvidate de Sovetio batalas por la mondopaco.

Paco, paco, paco! Jen devizo aŭ baza ideo de la plej multaj artikoloj en la lastaj du duoblaj numeroj de »Esperanto-Servo«. Klopodu, samideanoj, ke eĉ unu ekzemplero de tiu ĉi instiga kaj enhavoriĉa bulteno ne restu hejme! Ili estas nepre legendaj kaj efektive legindaj en la tuta mondo.

Du popolantojn, ĉeĥan (»Kiam kutimis mi iri al vic tradukitan de Miloš Lukáš) kaj slovakon (»Manĝu min, ho lupino« tradukitan de J. V. Dolinský) eldonis Instituto de E-Servo presitajn apud mapo de nia respubliko. La bela duobla poŝtkarto estas destinita por esti sendata al fremdlandaj amikoj. Petu ilin de la Instituto (Malá Štěpánská 7, Praha II) kaj uzu ilin por tiu celo.

Propra klubejo de la Junularo de Esp. klubo en Praha estis malfermita komence de oktobro en Praha XII, Římská 35, telef. 317-24. Ĝi havas du ejojn plaĉe ornamitajn kaj elmontran fenestron. Kunveno ĵaŭde 19 h.: ĉiutaga detoro 16—21 h, laŭokaze eĉ tuttage. Biblioteko fondata, ĉefe el donacoj. Ĉiutaga gazet-legejo de la Esp. klubo Praha. Bufedo instalota. La Junularo havas la rondetojn: muzika, teatra, filatela, turisma. Ĝi prizorgas jam 21 varbkestetojn en la urbo. La junularejo promesas esti ĉiutaga rendezvejo esperantista, ĉiu samideano estas bonvena. La viglanta junularo mem ĉion havigis al si kaj ĝi planas pluajn aferojn. Ĝi meritas koran gratulon. (jm)

Ripozejo de D-ro Esperanto en Kopřivnice, granita bloko sur mezo de kvinpinta stelo en publika parko, estis inaŭgurita la 24-an de septembro dum regiona kunveno de Ostrava-regiono. Ni enpresas bildon el la inaŭgura ceremonio. En la kunveno ĉeestis ĉ. 80 partoprenantoj, en la programo krom la kutimaj eroj estis prelezo de Rudolf Hromada: Pri la plej oftaj eraroj gramatikaj kaj stilaj, kiujn faras ĉeĥaj esperantistoj.



LOKAJ INFORMOJ

Brno. — Programo de la E. K.: 12. IX. Meditado de Otakar Březina (M. Adamcová). Fonetiko en Esperanto (Jiří Kořínek). 19. IX. E-movado en Nederlando (Cor de Waart). 26. IX. Penicilino kaj streptomicino (Josef Jílek). Pri la ĉelo (J. Vondroušek). 5. X. Ni kantu! (Junulara kolektivo sub gvido de Věra Borská.) 10. X. Historio de E-movado en Bulgario (Ivan Kunčev). 17. X. Filmo pri la 8-a ĉsl. kongreso en Brno (Jaroslava Konečná). Eliška Krásnohorská en virina movado (Drahomíra Chlubnová). 24. X. Poezia kaj melodrama vespero (Junulara kolektivo sub gvido de Věra Borská). 31. X. Literatura vespero (Kolektivo de Jaromír Hoffner). 7. XI. Teatraĵo de D-ro Tomáš Pumpr: Ĉe-instruisto inter kanibaloj (Reĝisoras Věra Borská). 14. XI. Rememoro pri komponisto Frant. Zita (Marie Adamcová). Kantas Wanda Zitová, Frant. Crha, ĉe piano Inĝ. Dro B. Hruška). 21. XI. En serpent-kapiteco (Afrika aventuro, Marie Sousedíková). Tridek du jarojn en eksterlando (Josef Ballay). 28. XI. Pri Abisenio (Dagmar Zezulová). Rakontado pri Brazilo (Terezie Endlová). 5. XII. Nikolao vespero. 12. XII. Solena artvespero al Dro L. L. Zamenhof (Prof. V. Scheiber). 19. XII. El rikolto de leganto (Josef Friedrich). Problemo de lingvoscienco laŭ J. V. Stalin (Jiří Kořínek).

Břeclav. — En lerneja ciklostilata gazeto de industria kaj soc. higiena lernejo aperis en majo traduko de letero, kiun ricevis de nederlanda korespondanto la klaso E 2.

Děčín. — Ĉiu esperantisto, vizitinta dum julio tiun ĉi urbon estis agrable surprizita. Jam en la stacidomo li trovis en la atendejo ampleksan ekspozicion de infanaj desegnaĵoj; en la mezo aparte instalitaj oni trovis desegnojn de infanoj hungaraj, japanaj, anglaj, francaj, finnaj kun indiko, ke oni interŝanĝis ilin pere de Esperanto. Kaj en la libro de vizitantoj oni legas enskribojn laŭde agnoskantajn tiun ĉi kunlaboron de diverslandaj infanoj kaj la valoran servon, kiun Esperanto faras al tiu ĉi porpaca edukado. La koro de sincera esperantisto ekĝojas kaj li danke memoras la oferon laboron de la loka grupo esperantista, kiu tiel efike kaj tamen ne altrudeme informas la indiferentan publikon pri la uzado kaj bona servado de Esperanto kaj faras tion eĉ dum la someraj monatoj, kiam aliloke la esp. movado dormas.

Sed tio ĉi ne estas la sola surprizo en Děčín. Se vi elirinte el la stacidomo eniras rekte antaŭ ĝi la ĉefan straton, vi ekvidos post apenaŭ duminuta marŝo grandan surskribon ESPERANTO ĉe granda montrofenestro, kiu ŝanĝiĝis en veran Esperantujojn. En plaĉe aranĝitaj kadroj aparte por ĉiu lando videbliĝas ĉi tie vidaĵkartoĵ kaj esperantaĵoj el multaj landoj krom libroj, gazetoj kaj aliaj. Kaj se vi hazarde venos tien vespere, vi povas eĉ vidi en la meza kadro klare el la interno projekciatan tutan filmon pri Danujo, Nederlando k. a. Tio estas klubejo de la Děčína grupo kaj tio, kion vi vidas, estas rezulto de senlaca kaj oferema laboro de ĝiaj anoj. Koran dankon al vi, karaj Děčínanoj por via bona laboro kaj por la ĝojo, kiun ĝi preparas al ĉiu vera esperantisto! (B. Vlčková.)

Gottwaldov-Otrokovice. — La 18-an de junio vizitis esperantistoj el Otrokovice kaj Zlín samideanon Theodor Ĉejka en Bystřice p. H. por honorigi lian 50-jaran laboron por Esperanto. Maljuna pioniro kun sia afabla edzino akceptis vizitantojn en sia vilao. Post kelkaj salutvortoj de rondestro Omelka sekvis entuziasma alparolo de s-ano inspektoro Pítner, en kiu li tre detale pritraktis la meritojn de s-ro Ĉejka. Tiu, evidente kortuŝita per la vizito kaj per tiom elkoraj vortoj, rakontis pri la malfacilaj komencoj de la movado en nia lando, pri siaj vojaĝoj en fremdajn landojn, pri la lernolibroj, kiujn li eldonadis en sia propra »eldonejo« ktp. Li montris al siaj vizitantoj sian vere riĉan esperantan bibliotekon, en kiu troviĝas multaj valoraj unikaĵoj. Plej grandan intereson vekis longa originala letero de L. L. Zamenhof al s-o Ĉejka. Preskaŭ du horojn travivis

nij esperantistoj kun afablaj geedzoj. Antaŭ la adiaŭo donis s-ano Ĉejka al ĉiu vizitinto belan rememoraĵon: ekzempleron de Internacia Pedagogia Revuo, kiun li antaŭ jaroj redaktis. Novaj propagandistoj de nia lingvo certigis la noblan senlacan batalanton, ke lia laboro ne estis vana kaj promesis, ke ili daŭrigos sur lia vojo. — La kongreson en Brno partoprenis 20 anoj de nia rondeto. — Ĉar la ĝisnuna rondestro foriros el Otrokovice, estis elektita nova prezidanto s-ano Šebesta, kies populareco kaj aktiveco garantias pluan sukcesan vivon de E. en nia urbo. — La somerajn kursarojn vizitis 6 anoj: unu en Doksy, kvin en Svit. — (fom)

Hradec Králové. — La 17. VI. okazis prelego de Jar. Šustr el Praha pri Albert Bobovský, la 28. VI. deklama vespero »Vaĉoj el malproksimo«, poeziaĵoj de primitivaj popoloj tradukitaj esperanten de Valda Vinař. La versaĵojn prezentis kolektivo de la urbaj esperantistoj gvidata de V. Vinař kaj E. Suchardová, akompanata piane de prof. D. Motlová kaj per projekciataj bildoj pentritaj de E. Suchardová. Ĝi estis vespero neordinare bela kaj perfekta.

Jablonec n. N. — Dum la festotagoj de la 2—4a de julio okazis en nia urbo grandioza paca manifestacio, al kiu ĉeestis kaj partoprenis multaj miloj da homoj. Inter ili estis ankaŭ eksterlandaj delegitoj: Ĉinoj, Japanoj, Persoj, Irakanoj kaj 45membra delegitaro el Svedujo. Ili ĉiuj solutis en la nomo de siaj popoloj la pacan manifestacion. Nia esperanta klubo alvokis per afiŝoj ĉiujn pacamantajn homojn partopreni grandamase al tiu ĉi festo. Ĉiuj partoprenis ankaŭ en la procesio tra la urbo, ĉe kies frunto oni portis apud la ŝtata flago grandan verdan flagon esperantan. Estis certe la unuan fojon, post la milito, ke oni publike portis esp. flagon en iu procesio en nia regiono, eble ankaŭ en la tuta respubliko. Krom tio aranĝis nia klubo esperantan ekspozicion en la pionira domo, kiu estis solene inaŭgurita kaj vizitita de multaj homoj. La sukceso por Esperanto kaj por ni estis granda kaj ni povas esti kontentaj. (Roja.)

Kopřivnice. — La Klubo fariĝis loka grupo de nia Asocio.

Litvinov. — Referanto por preso estas Alois Brejcha, VI, Luční 14.

Nýřany. — Post finiĝo de la kurso gvidita de s-o Karel Valenta el Plzeň, konstituiĝis prepara komitato por fondi lokan grupon. Tiu fondo estis aprobita per dekreto de ONV-OVNB en Stod zn. 260/04-93 el 15. 7. 1950. Sekretariino estas s-ino Jana Pechová, Křížkova 349.

Olomouc. — Laborbrigado de la lokaj esperantistoj helpis la 3. VI. masonadi astronomian observatorion konstruatan de la Astronomia Societo. — En festivalo de paca konstruado la 2—10. IX. partoprenis lokaj samideanoj per plaĉe aranĝita ekspozicio en antaŭhalo de Reduto. — La kvina regiona konferenco okazos en Olomouc la 7-an de januaro 1951.

Ostrava. — Tradicia ekskurso sur monton Čantoria estis aranĝita la 18-an de junio, partoprenis ĝin malgraŭ pluvema vetero preskaŭ 100 gesamideanoj. Kelkaj venis eĉ el tre malproksimaj lokoj, Olomouc, Lanžhot, Slovakio ktp. Polaj gesamideanoj ne ricevis permeson por transiro de limo, do ili sendis salutleterojn kaj poŝtkartoĵojn.

Ostrava-Zábřeh. — E-societo Komenský aranĝis la 29. X. en restoracio U Eliášů je la 17-a h. propagandan bendon kun riĉa programo. Prez. Alois Kubala deklamis poemojn Bášník (Hálek), Ho mia kor' (Zamenhof) kaj Husaro (Puškin), Karel Janouš havis ĉeĥan prelegon »E. kaj ĝia estonteco«, J. Filgas: »Mia opinio pri E.«, Junulara Fakto el Ostrava prezentis sian programon, multaj gesamideanoj deklamis kaj kantis. La bendo estis inaŭgura aranĝo por kurso en novembro — marto. Kurŝkotizo 50 Kčs.

Praha. — E. K. estis devigita denove ŝanĝi ejon de siaj kunvenoj. Depost la 4-a de oktobro ĝi kunvenas ĉiumerkrede je la 20-a horo en restoracio »U Šumavy« en Praha II, Štěpánská 3 (vid-al-vide preĝejo, stacio de tramoj 2,

16, 20, trolejbusy 52, 53, 54, 55). Por ĉiu merkreda kunveno estas preparita riĉa kaj valora programo. Antaŭ ĉiu kunveno okazas je la 19—20 horo konversacia kurso gvidata de Ant. Slanina. Junularo fako estas reorganizita kiel grupo de la Ĉs. Asocio Junulara (ĈSM), havas 36 anojn, gvidas ĝin Jan Neumann. La junularo kunvenas ĉiujn, instalas multajn propagandajn kestetojn en la urbo, okazigis komenculan kurson, ekzercas kantojn kaj deklamojn, organizis konkuradon en korespondado kun eksterlando. — Kursoj estas entreprenataj kune kun »Klerigaj kunularoj« ĉe Distrikta Nacia Komitato en Praha 2. Flugfolioj invitantaj al tiuj kursaroj estis liveritaj en fino de septembro kun la manĝokuponoj al ĉiuj loĝantoj de la koncerna kvartalo ĉefurba. — Malfermo de la kunvenoj la 4-an de oktobro estis solena. Prezidanto J. Šustr resumis en sia parolado progreson de la movado en la mondo kaj CSR dum 1950 kaj alvokis ĉiujn membrojn kunlabori kun la kluba komitato por progreso, ilo de tutmonda paco. La kluba junularo kantis sub konduko de s-ano J. Forman kelkajn kantojn, i. a. tiun de la demokrata junularo. M. Nývlt deklamis sentplene la poemon »Nia lingvo« de Baghy. S-ino Hronová-Zvėdėlikov kantis kvar kantojn el la ciklo »Tra l'silento« de E. Privat laŭ melodioj, komponitaj de konservatoria prof. Št. Urban en Praha; du el ili estis prezentitaj la unuan fojon entute. Post kiam s-ino Urbanov plaĉe deklamis siajn poemojn pri la maro, s-ano J. Šimek el Rokycany kantis la arion de Nikso el »Najado« (Dvořk) kaj arion el »Barburo de Sevilla« (Rossini). Fine li kantis la satiran kanton »Estas mi esperantisto« (Baahy) laŭ melodio de prof. Urban. Pianis M. Vcov el la Ŝtata konservatorio kaj E. Urbanov. — La bonsukcesa aranĝo estis brue aplaudata de la 75 ĉeestantoj. (jm)

Puchov. — Kurso komenciĝis la 6. III. por 28 gejunuloj

Ĉeské listy o esperantu

Otiskujeme dnes v této rubrice článek B. Serebrennikova z listu Komsomolskaja Pravda z 29. srpna jak byl uveřejněn v Lidových novinách z 20. září. Otiskujeme ho zvláště pro jeho tři poslední odstavce.

Proč národy světa mluví různými jazyky.

Na zeměkouli je kolem 3000 různých jazyků. Je přirozené, že mnohé lidi již dávno zajímala otázka, proč národy hovoří různými jazyky a čím možno objasnit rozdíly mezi těmito jazyky. Různé legendy, pocházející z pradávných dob a kolující mezi nejrůznějšími národy, přinášejí jakési vysvětlení, podle něhož z původního jednoho jazyka se pojednou vyvinulo celé množství rozdílných jazyků. I bible obsahuje známou legendu o stavbě »babylonské věže«, při níž přý došlo k rozdělení jazyků.

Tolik legendy. S postupným rozvojem vědy se počaly objevovat různé teorie o původu jazyka. Jedna z prvních teorií vysvětlovala, že slova se vyvinula napodobováním různých přírodních zvuků. Jiná teorie opět vykládala, že prvými slovy, jichž lidé požívali, byly různé výkřiky, vyjadřující pocity. Proti těmto výkladům mluví však skutečnost, že slova, která by šlo takto vysvětlit, je v jednotlivých řečích velmi málo.

Německý vědec Noire uváděl vznik řeči v souvislosti s pracovními výkony. Podle něho lidé se snažili vyjádřit zvuky vznikající při vykonávání práce. Tak na př. německé slovo pro oheň »Feuer« zřejmě souvisí s činností foukání do ohně. Ovšem proti této teorii mluví opět skutečnost, že v řadě jazyků výraz pro oheň nelze uvést v souvislosti s činností foukání do ohně. Finský oheň se říká »tuli« a tatarský »ute«.

Vznikly však i další teorie. Tak středověký spisovatel Augustin tvrdil, že latinský výraz pro med »mel« vznikl zřejmě proto, že je pro lidské ucho libozvučný. Jak by bylo možno však vysvětlit podle této teorie skutečnost,

en entreprena klubo de Makyta, iniciatita de s-o Ed. Matejka.

Trenčín. — E-Rondeto estis fondita la 21. V. ĉe Uzina kultura klubo ROH ĉe Merina. La fondo okazis en kadro de la III-a regiona kunveno en Trenčín.

Trnava. — La 25-an de junio 1950 okazis IV-a regiona kunveno, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 30 gesamideanoj el Slovakujo kaj 4 delegitoj el Veselí nad Moravou. Post la antaŭtagmeza laborkunveno la ĉeestantoj ĝuis posttagmeze ekskurson per aŭtobuso de nacia entrepreno Kovosmalt en Trnava al famaj grotoj Driny ĉe Smolenice.

Trutnov. — Pri bela interesperantista helpo konvinkis nin denove samideanino Milly Dellacella en Genova, Italia. Juna knabino en malsanulejo en Trutnov bezonis por refreŝigo de sia sango oranĝosukon. Unu samideano el grupo tuj skribis al sia amikino en Italio kaj post 14 tagoj alvenis du malgrandaĵ paketoj da oranĝoj kaj post ia tempo denove du. La knabino estas jam sana kaj diras, ke esperantaj oranĝoj estis banaustaj. Ni pensas same kaj denove dankas. — Du samideanoj el la grupo, s-ano Suchánek kaj s-ino Jebav partoprenis en la Somera kolegio en Doks. Klubaj kunvenoj estas somere 14 tage, ĉiam marde, 8 horo vespere, Národní dům. Klubo aranĝis kunvenojn en naturo (urba parko). Krom kantado estas ankaŭ en programo citrokonzerto de nia bona f-ino Bernatschkov. Anoj de klubo ricevis multe da interesaj esperantaj broŝuroj el la tuta mondo. (O. s.)

Určice u Prostějova. — Meza lernejo en Určice havas 11 interesrondetojn. Precipe viglas rondeto esperantista, ĉar la lernantoj jam korespondas per Esperanto kun lernantoj el Sovetio, popoldemokratiaj landoj, Irano, Francujo, Argentino, Japanujo k. t. p. Ni tradukas tiun ĉi informan el la tagĵurnalo Práce, Olomouc, 30. IX. 1950.

ĉe v ĉuvaŝském jazyce existuje pro výraz mrtvola libozvučné slovo »vile« a že v tatarském jazyce existuje pro výraz vlastovka nelibozvučné slovo »karlygač«.

Theorie N. J. Marra o původu jazyka se opírala o tvrzení, že veškeré bohatství řeči současných jazyků vzniklo původně z magických obřadů, obsahujících tance, zpěvy, hudbu a invokace k magickým silám. Proti této teorii možno především uvést, že lidská práce původně nebyla vždy provázena magickými obřady. Proto ani tato teorie nepřináší uspokojivou odpověď na otázku, proč národy světa hovoří různými jazyky.

Vzniká otázka, zdali je nějaká organická souvislost mezi spojováním zvuků, jež sloužily k vyjádření názvů předmětů, a mezi samotnou podstatou těchto předmětů. Velmi početná fakta nás vedou k přesvědčení, že taková organická souvislost neexistuje, protože též předmět v různých jazycích je vyjadřován velmi odlišně. Tak na př. výraz pro slovo kůň ve starořečtině zní »hippos«, v novořečtině »allogos«, v norštině a dánštině »hest«, v němčině »Pferde«, v tatarštině »at«, v albánštině »kal«, ve finštině »hevonen«, v lotyštině »zirgs« atd. Ovšem v rámci jednoho jazyka nebo jedné skupiny příbuzných jazyků lze mnohdy vysvětlit, proč ten který předmět se nazývá tak či onak.

Jak tedy možno vysvětlit, proč vznikly na zeměkouli různé jazyky? Je zjištěno, že od nepamětných dob lidské kolektivy žily rozptýleně a v izolovaných skupinách. Je velmi pravděpodobné, že stáda lidoopů neměla ještě žádného jazyka, stejně jako nemají jazyk nynější opice, podobající se člověku. Jazyk vznikl a rozvinul se současně s myšlením při procesu práce. Zvuková řeč vznikla samostatně u různých izolovaných lidských kolektivů. Tento proces se neudál současně. To by vysvětlovalo, proč tytéž předměty u různých lidských kolektivů obdržely nejrůznější jména. Rozdílnost označení jednotlivých pojmů a předmětů v různých jazycích svědčí o tom, že nebylo žádné

souvislosti mezi jazyky při jejich vzniku. Nelze tudíž mluvit o t. zv. prajazyku.

Až do diskuse o jazykozpytu, otištěné v listu »Pravda«, byla otázka dalšího rozvoje lidských jazyků krajně nejasná. Geniální práce J. V. Stalina o otázkách jazykovědy přinesly klíč, umožňující chápání procesu rozvoje lidských jazyků. Můžeme si představit rozvoj jazyků jako proces jejich mnohonásobného směšování, dírobení a spojování ve větší celky. Původně jednotný jazyk některého plemene či národa se mohl rozdělit na různé jazyky v důsledku územního rozptýlení tohoto plemene či národa. Tak mohly vzniknout různé jazyky, které však jsou navzájem příbuzné. Tak také jistě vznikly slovanské jazyky.

Rozdělením původního jednotného jazyka mohlo se udát různým způsobem. Soudruh Stalin dále ukazuje, že různé misioní dialekty se staly základem jednotlivých řečí národů. Tak dialekt kursko-orelský byl podkladem ruského jazyka, dialekt poltavsko-kijevský základem ukrajinského jazyka a podobně. Při smísení dvou různých jazyků nevznikl nikdy nový, třetí jazyk, který by se lišil od původních dvou jazyků. Nejrychlejším změnám v různých jazycích podléhal slovník. Nejméně se naproti tomu menila gramatická skladba jazyka, která u jednotlivých jazyků zůstala nezměněna po celá tisíciletí.

Odpověď na otázku, proč národy světa hovoří různými jazyky, dlužno tedy hledat v drobení a izolovanosti lidských kolektivů v období vzniku jazyků. Přes značné rozdíly jednotlivých jazyků jsou tyto jazyky přece jen spjaty jednotou lidského myšlení. Proto věta, myšlenka vyjádřená slovy v jednom jazyce, může být přeložena do jazyka druhého.

Je nesporné, že komunistická společnost bude jednou používat jediného jazyka pro veškeré lidstvo. Ovšem k tomu dojde až dlouhým vývojem. Prvé období světové diktatury proletariátu, za něhož bude definitivně likvidován národnostní útlak, bude ve znamení růstu a rozkvětu dříve utlačovaných národů a jejich jazyků. Teprve v druhé etapě, až se upevní světové socialistické hospodářství, počne se rodit společný jazyk. Různé národy tehdy pocítí potřebu mít společný jazyk. V tomto období bude vedle národních jazyků existovat i jazyk mezinárodní.

Je možné — zdůraznil J. V. Stalin — že zprvu nevznikne společný jazyk pro celý svět, nýbrž vzniknou postupně společné jazyky pro velká světová hospodářská střediska a že teprve v posledním období dojde k vytvoření společného jazyka pro všechna tato střediska.

Až socialistické zřízení ovládne celou zeměkouli a až všechny národy světa se přesvědčí o přednostech společného jazyka před národními jazyky, národní jazyky počnou odumírat a ustoupí nakonec úplně jednotnému společnému jazyku lidstva. Tímto jazykem nebude ani němčina, ani ruština, angličtina, nýbrž nový jazyk, obsahující nejlepší prvky národních a oblastních jazyků.

Bohatá činnost střední školy v Určicích. Střední škola v Určicích u Prostějova má 11 zájmových kroužků. Zvláště čile si vede kroužek esperantský, neboť esperantem si již žáci dopisují se žáky sovětskými, dále v lidově demokratických státech a v Iránu, Francii, Argentíně, Japonsku atd. (»Práce«, Olomouc, 30. IX. 1950.)

Překlady z češtiny v Číně. Až dosud vyšly v čínském překladu básně a povídky některých našich spisovatelů 19. století, zvláště Jana Nerudy, Svatopluka Čecha a Jaroslava Vrchlického, z novějších autorů byl překládán zvláště K. Čapek. **Většina těchto překladů byla pořízena z esperanta.** Nyní kulturní pracovníci Čínské lidové republiky plánují daleko systematictější a přímé překládání literatury lidových demokracií, při čemž budou hojně zastoupeny současně česká a slovenská poesie a próza. (Lidové Noviny, Praha 26. III. 1950.)

SCIIGOJ

La 36-a Universala Kongreso okazos en Munkeno (München) de la 4-a ĝis 11-a de aŭgusto 1951.

Radio Roma disaŭdigas esperantlingve ĉiudimanĉe kaj ĉiundie de la 17,00—17,20 MEI sur mallongaj ondoj 17,5 kaj 31,1 metroj. Aŭskultu kaj konfirmu la aŭskulton al Radio Roma, Via Veneto 56, Italiao.

Esperanto-Stenografio laŭ ĉsl. sistemo Herout-Mikulík. Kun eniandaĵ cenoj kaj slovakoj korespondas la aŭtoro Adolf Staňura, Táborská 42, Ostrava-Radvanice.

Al ĉiuj bonvolaj samideanoj, kiuj povus dediĉi kelkajn horojn semajne el sia libera tempo por nia komuna afero, mi direktas ĉi tiun alvokon. Ni povus per kolektiva laboro prepari materialon por

KOMPLETA VORTARO,

kiu enhavus ĉiujn vortojn uzatajn ĉe bonaj modernaj aŭtoroj. Multaj tiaj vortoj mankas en Plena Vortaro. La laboro, dividita inter aro da kunlaborantoj ne estus malfacila por unuopuloj. Se Vi povus kaj emus helpi, aligu al mi senriske kaj sentime. Mi sendus al Vi specialan instruon kaj se vi trovus vin kapabia por la tasko, ni interkonsentus pri ĝi. Post kelkmonata komuna laboro ni povus disponigi al esperantistaro indan materialon aŭ verkon.

Prof. Josef Kožený, Kutná Hora.

Odbočka v Lanškrouně ŝadas odbočky o zprostředkování koupě staršího dobrého diaporojektoru rozmerů 8½×8½ cm na promítání esperantských světelných obrazů, které dohodovujeme. Za obstarání nebo zprostředkování koupě jsme ochotni příslušné odbočce pomoci v esperantské propagaci našimi světelnými obrazy. Svaz esperantistů CSR odbočka Lanškroun, Gottwaldova 65.

ESPERANTISTA VIVO

Edziĝo. Oluška Kuželová kaj Luboš Kovář en Roztoky ap. Jilemnice 22. X. 1950.

Edziĝo. Karel Kraft kaj Bohuslava Kaštanová, membroj de E. K. Hradec Králové, en oktobro.

Al ambaŭ junaj paroj sinceran bondeziron.

Josef Rebiček sepdekkvinjara, la 6-an de aŭgusto 1950. Ni salutas la senlaca laboranton en faka terminologio fervojoista tre sincere.

Radio Hilversum I (ondo 402 m) la 15-an de decembro je 18,15 h. parolado de C. P. Brakké: La tago de la libro. Konfirmu aŭskulton al N. C. R. V., sekcio Disaŭdigo, Schutterweg 8, Hilversum (Nederlanda).

Lernolibro por kursoj

estas ricevebla en nia oficejo. Ĝi estas ciklostilita eldono de kursaj tekstoj de prof. Ing. Lad. Krajič el České Budějovice. Mendu por viaj kursanoj, eĉ se vi instruas laŭ alia alia metodo. Prezo 20 Kčs.

Korespondi deziras:

18-jara Tonka Ĝakarova, Struma 18, **Burgas**, Bulgario kun junaj esp-istoj kaj intŝ. pm.

Janny Leeuw, Irisstraat 20, **Steenwijk**, Nederlando.

H. H. de Vries, Vledderweg 106a, **Vledder** (Nederlanda).

Tomáš Adamec, Domov průmysl. mládeže, **Gottwaldov-Otrokovice 332**, kun tuta mondo. Respondo certa.

Jaroslav Adolt, Soukenická 19, **Ostrava I**, kun amikoj el tuta mondo, ankaŭ el ĈSR.

Resuma historio de la Esperanto-movado. (Daŭrigo.)

Internacia periodo (1904—1914). La institucio de universalaj kongresoj multe helpis al firmigo de la movado kaj enpenetro de E. en praktikan vivon. La unua en Boulogne sur Mer (aŭgusto 1905) vekis grandan entuziasmon, ĉar unuan fojon esperantistoj diverslandaj kunvenis en granda nombro por efektive interkompreniĝadi en la nova lingvo. La kongresa parolado de Zamenhof estis granda venko de lia personeco. La kongreso akceptis Deklaracion pri esperantismo kaj elektis Lingvan Komitaton. En Parizo fondis generalo Sebért »Esperantistan Centran Oficejon«, kiu fariĝis sekretario de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj (fondita en la dua kongreso en Genevo), kaj eldonadis »Oficialan Gazeton Esperantistan« (de 1908—1920, entute 7 volumoj). Dr. Javal kaj Sebért malavare kovris la defecitojn. En 1906 komencis aperadi La Revuo redaktata de Carlo Bourlet kun konstanta kunlaborado de Zamenhof. En 1907 eksplodis krizo pro decido de la Delegacio alpreni Esperanton kun ŝanĝoj laŭ la Ido-projekto. Sed dum du jaroj la krizo estis venkita. En 1908 estis fondita UEA. La kvin lastajn jarojn antaŭ esplodo de la milito rigardas P. Stojan kiel apogeon de nia movado kaj literaturo. Unuafajlon aperis dikaj originalaj volumoj de Valliene, Luyken, unuaj antologioj, grandaj tradukaĵoj (Makbeto, Robinsono, Fabiola, Faraono, Marta, For la armilojn, Patroj kaj Filoj) sciencaj kaj teknikaj verkoj, La Nova Testamento, Zamenhof aperigas sian tradukon de la kvin unuaj libroj de la Malnova Testamento. La lingvo ellaboriĝis pli profunde kaj fakte. La franca influo moderiĝis pro novaĵ voĉoj el la germana, angla, slavaj, hispana kaj portugala landoj.

Oni multon atendis de la deka kongreso en Parizo, kiu estis malhelpita de la mondmilito ĝuste antaŭ sia inaŭguro.

La unua mondmilito (1914—1918) preskaŭ ĉesigis la movadon. Tamen en 1915 okazis universala kongreso en San Francisco kun 163 p. el 16 landoj kaj 17 registaraj reprezentantoj. »Esperanto« en Genevo aperadis de post 1915 regule, nombro de servoj faritaj al militviktimoj estas impona.

La rekonstruo (1919—1925) progresis rapide. Ĉefa intereso estis turnita al organiza demando. Naciaj propagandaj societoj, ekzistantaj kaj plifortiĝintaj antaŭ la milito jam en pluraj landoj, nun rapide restariĝis kaj kun ĵaluzemo rigardis sendependan UEA kvazaŭ forprenantan la kotizojn, kiuj devus plejparte aparteni al ili. La burĝa kapabla esti meceno malaperis. La movado estis devigita vivi el propraj rimedoj. Interkonsento estis nepre necesa. En kongreso en Helsinko 1922 estis akceptita Kontrakto inter UEA kaj Naciaj Societoj. Estis kreita Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj, en kiu estis reprezentitaj ĉiuj aliĝintaj naciaj societoj pagantaj malaltan kotizon laŭ la membronombro. Ĝi kaj UEA-komitato sendis po 3 membroj en »Internacian Centran Komitaton«, kiu reprezentis la tutan neŭtralan movadon. Direktoro de UEA estis Hans Jakob, de ICK Robert Kreuz. Prezidanto de ICK estis Edmond Privat. Tiu aranĝo aperis vivipova kaj ebligis turni si al publikaj korporacioj. La Ligo de Nacioj komisiis sekve de rezolucio subskribita de 13 ŝtatoj (inter ili Ĉeĥoslovakio per tiama eksterlanda ministro Ed. Beneš) unu el siaj tri ĝeneralaj subsekretarioj japanon Dron Nitobe fari enketon kaj verki raporton pri Esperanto en lernejoj. Dron Nitobe vizitis pro tiu komisiio la 13-an Kongreson en Praha. Lia detala raporto estis prezentita al la tria ĝenerala kunveno de

Ligo de Nacioj en sept. 1922. Ĉi estis akceptita de la kunveno kaj transdonita al la Komisiono por Intelektala Kooperado; tiu ĉi en aŭg. 1923 decidis rekomendi anstataŭ Esperanto studadon de vivantaj lingvoj, kiel plej potenca rimedo por alproksimigi diversnaciajn homojn. En 1924 ĝenerala kunveno de LdN rekomendis trakti Esperanton kiel klaran lingvon por telegrafado kaj en 1925 Universala Telegrafa Unio akceptis tiun ĉi rekomendon en sia kongreso en Parizo.

Estis aranĝitaj pluraj Teknikaj Konferencoj kunvokataj de duonoficialaj korporacioj (la unua en 1922 en Genevo en Palaco de Ligo de Nacioj pri instruado de Esperanto). Dum kongreso en Genevo 1925 estis inaŭgurita la unua Somera Universitato. La ĉefa iniciatinto de tiuj ĉi entreprenoj estis Edmond Privat.

En 1921 okazis apartiĝo de la laborista movado dis de la neŭtrala. Estis fondita Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kies unua kunveno »La ruĝa kongreseto« okazis en Praha, 1.—3. aŭg., okaze de la Universala kongreso, kun honora prezidanteco de H. Barbusse. La nova movado turnas sin al klaskonsciaj laboristoj propagandante inter ili Esperanton, batalante por socialismo en ĉiuj ĝiaj formoj kaj imitante en sia organizo elprovan statuton de UEA. Ĝi firmiĝas, eldonas bone redaktitan »Sennaciulon«, farigos eldonanto de gravaj libroj kaj antaŭ la dua mondmilito venos en kelkaj landoj al paradoksa stato, ke la neŭtralaj organizaĵoj pretendantaj reprezenti la tutan movadon estos malpli fortaj ol la laboristaj, kaj en 1949 la kongresoj de UEA kaj SAT havis proksimume la saman nombron de kongresanoj.

La faka periodo (1925—1934) estas karakterizata per klopodado enigi la lingvon en tekstan uzadon ĉe publikaj instancoj. Temis pri uzado sur poŝtmarkoj, poŝtkartoj kaj en poŝtofacejoj, en fervojo, fervojaj, vagonoj trafiko diversspeca, radio, telefonado. Sovetio eldonis unuan poŝtmarkon kun ruslingva kaj esperant-lingva teksto en 1925 kun bildo de »Inventisto de Radio Popov« kaj sekvis pluraj aliaj; Sovetio uzis Esperanton ankaŭ sur oficialaj poŝtkartoj kaj leterkovertoj destinitaj por fremdlando. Sekvis tiun ekzemplon pluraj ŝtatoj (Brazilo, Bulgario, Aŭstrio); ankaŭ oficialaj bildkartoj estis eldonitaj kun esperantlingvaj tekstoj (Liechtenstein, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Danzig, Aŭstrio). Uzo de nia lingvo en radio fariĝadis pli ofta. Verda Stacio en Brno kaj Pariza stacio estis pioniroj de arto-programoj. Andreo Cseh aperis kun sia metodo kaj edukis disĉiplojn. Multiĝis seriozaj prelegvojaĝantoj.

Nuligo de Helsinko-kontrakto en Pariza kongreso 1932, Interkonsento de Kolonjo 1933 kaj ekŝigo de Stettler kaj Hans Jakob el gvido de UEA signifis revenon al organiza haoso.

Traduko de la 4-a ekzerco.

1. Niaj antaŭuloj konis nek traktorajn nek draŝmaŝinojn. 2. En julio kaj aŭgusto ni iras al brigadoj helpi por rikolti grenon, en septembro ni helpas rikolti sukerbeton, terpomojn kaj lupolon. 3. En agrikulturo estis plenumita la plano je 105 procentoj. 4. La tero apartenas al tiu, kiu sur ĝi laboras. 5. Niaj fervojoj transportis tiun ĉi jaron pli da pasaĝeroj ol pasintjare. 6. Liberigo de Praha fare de la Ruĝa Armeo estiĝis historia dato. 7. En fenestroj aperis ruĝaj flagoj. 8. Sturmuloj en unuajn vicajn! 9. Ĉiu membro de Ĉeĥoslovaka Asocio Junulara estu sturmulo! 10. Stalina plano transformi la naturon estos realigita.